

Nur la predikataj adjektivoj kaŭzas aldonajn 61 elementojn kaj pli ol duobligas la lernendaĵon sur la adjektiva kampo.

Tiuj 107 elementoj sumiĝis ankoraŭ sen konsideri la komparacion.

La enrangigo de la ses lingvoj laŭ la plej malgranda nombro da lernendaĵoj por ekregi la adjektivan deklinacion sen konsidero de la komparacio estas aparte klara:

1. Angla
2. Esperanto
3. Hispana
4. Germana
5. Franca
6. Rusa

La senkonkurenca ĉampioneco de la angla en ĉi tiu stadio de la studo dankiĝas al la fakto ke la angla per ŝlifo kaj per kunfandiĝo de la englosaksa kun la normanda-franca lingvo perdis ĉiujn finaĵojn kaj pro tio tute same kiel la turka havas senfleksian adjektivon.

Eĉ Esperanto estas pli fleksia, kvankam ĝia sistemo malgraŭ la akuzativo kaj la akordo estas pli simpla ol la senakuzativa hispana, kiu okupas kune kun la germana tre evidente la mezon de la ranglisto.

Same memkomprenebla estas la negativa kvanta rolo de la franca kaj la rusa en ĉi tiu rangordo, kiu preciziĝos ĉe la komparacio.

Fontoj

Pfaffen: Langenscheidts Praktisches Lehrbuch Russisch, Langenscheidt, Berlin/München, 1960/1980

Potapowa: Sprachkursus Russisch, Langenscheidt, Berlin/München, 1965/1967

Babel: Pons Grammatik kurz & bündig RUSSISCH, Klett, Stuttgart, 2005

(daŭrigota)

<g.tucker@gmx.de>

Aŭtora adreso kaj priaŭtora informo en SR 3/2009, p.182

Karesi literojn

Martin EBNER

Okaze de la 200-a naskiĝdatreveno, en 2009, de *Louis Braille*
oni jubilee festis la "brajlan skribon"

Fariĝi almozulo – tio sufiĉe longe estis la sola profesio por blinduloj. Do estas kompreneble, ke la selisto *Simon Braille* multe zorgis, kiam lia infano *Louis*, ludante kun kudrilego, elpikis okulon kaj pro infekto perdis ankaŭ sian duan. En ilia hejma vilaĝo *Coupray*, oriente de Parizo, ne estis estonteco por la talenta knabo. Sed *Louis Braille* havis bonŝancon en la mizero, ĉar liaj gepatroj, la pastro kaj la urbestro obstine pledis, ke li ricevu stipendion por la blindula lernejo en la franca ĉefurbo.

En la Pariza "Instituto por Blinduloj", fondita en 1784 kiel unua tiuspeca organizo en la mondo, la juna *Louis* komplikmaniere lernis legi helpe de grandaj reliefliteroj, sed ne povis mem skribi. Des pli li estis entuziasmigita, kiam iun tagon kapitano *Charles Barbier* vizitis la lernejon kaj prezentis ian "nokto-skribon": Por doni komandojn al soldatoj en malluma nokto, nerimarkate de la malamikoj, la armeano estis inventinta komplikan silaban skribaĵon kun palpeblaj punktoj kaj strekoj. Kvazaŭ obsede *Louis* laboris tri jarojn por simpligi tiun ĉi sistemon kaj fari ĝin praktike uzebla.

En la jaro 1825 la baza formo de la "skribo por blinduloj" estis preta, kiu hodiaŭ portas la nomon de *Braille*: ĉiujn literojn ĝi kodas per nur ses punktoj, kiujn oni pregas en la paperon – grifele, skribmaŝine aŭ komputile – tiumaniere, ke oni povas palpi ilin poste per la fingropintoj.

La punktoj, ĉiufoje aranĝitaj kiel tiuj de la ĵetkuba "ses", estas en rastrumoj de 6 oble 4 milimetroj kaj rezultigas 64 kombineblojn. Se ekzemple elstaras nur la plej supra punkto maldekstra, oni legas tiun kiel "a". Se ĉiuj tri maldekstraj punktoj elstaras, tio signifas "l". Kaj se oni sur la glata surfaco palpas nenion, tio estas spacosigno.

Kutime oni skribas nur malgrandajn literojn en la punktoskribo. Se oni volas emfazi ion, oni antaŭmetas certan signon por majuskla skribo. Kiel sur la klavo de poŝtelefono oni povas legi literojn – per antaŭmeto de inversa brajla elekto – ankaŭ kiel ciferojn. Por specialaj signoj ĉe diversaj fremdlingvoj kaj oftaj liter-kombinoj, la blindula skribo ĉiufoje havas proprajn signojn. Ekzemple la "ch" de germanaj tekstoj estas en la franca lingvo "ô", en la angla



"th" kaj en la ĉina "yong". Propraj signoj ekzistas ekz. por ĥemio, matematikaj formuloj aŭ ankaŭ ĉe trikadaj ŝablonoj.

Speciale grava estas la blindula skribo de muziknotoj, kiun la entuziasma orgenisto *Braille* prezentis en la jaro

Louis Braille (1809-1852)

Pentraĵo sur eburo de *Lucienne Filippi* (1966)

1828. Ekde tiam ne nur viduloj sed ankaŭ blinduloj povas fariĝi profesiaj muzikistoj. La signoj preme presitaj en la paperon permesas al la blinduloj kvalifikiĝi, ankaŭ interkompreniĝi kaj unuiĝi en memhelpaj organizaĵoj. Ekde la jaro 1900, kiam en Luksemburgo estis enkondukita la deviga lernejo vizito ankaŭ por blindaj infanoj, la brajla skribo estas la fundamento por la instruado de forte vid-handikapitaj lernantoj.

"La punktoskribo estas genie facila", entuziasme priskribas *Urs Rehmann* de la blindula biblioteko en *Landschlacht* / Svislando: "Se oni sin trejnas regule, kiel faras pianoludanto, oni atingas bonan legorapidecon. Problemo estas, ke la A4-folio havas spacon nur por ĉirkaŭ 28 linioj po 28 tajpmaŝinfrapadoj. La spac-bezono tamen estas proksimume kvindekoble pli granda ol ĉe la normala 'nigra skribo' de vidantoj", klarigas *Rehmann*: "La Biblio ampleksas 48 grandajn volumojn – tutan breton en la bretaro. Pro tio, la plej multaj blinduloj havas hejme nur unu aŭ du librojn en la brajla skribo, kiuj estas plej gravaj por ili, ekz. kuirlibron". Aliajn librojn ili prunteprenas de bibliotekoj. Tio estas, per blindula sendaĵo, senpaga. En jaro aperas po ĉirkaŭ 2000 germanlingvaj publikigaĵoj en la punktoskribo. "Haveblas ankaŭ groŝo-romanoj. Sed

pro ties relative multakosta produktado oni jam projektas duonigi la eldonon".

De kiam ekzistas la elektronikaj informsystemoj oni profetas la finon por la brajla skribo. Sed dum bibliotekoj jam forĵetas aŭdokasedojn, oni povas ankoraŭ nuntempe pruntepreni la punktskribajn dikedajn librojn. Krome oni povas palpi komputile la retpaĝojn aŭ kodoromajn dosierojn helpe de la "brajla linio". Tio estas rubando laŭlonge de la klavaro, per kiu leviĝas kaj malleviĝas malgrandaj metalstiftoj. El la nunaj ĉirkaŭ 155 000 blinduloj en Germanio tamen nur proksimume triono scias legi helpe de la fingroj. Por festi la 200-an datrevenon de la naskiĝtago de *Louis Braille* (la 4an de januaro 2009) asocioj de blinduloj kaj bibliotekoj lanĉis iniciativojn por progresigi la punktan skribon: prelegoj en la tuta Germanio, somera festivalo en Hanovro, aŭtuna ekspozicio en la Berlina "Muzeo de Komunikado".

"La ĉiam denove observata ofteco de ortografiaj eraroj ĉe junaj blinduloj, la tendenco al la "aŭdo-aspergado" kaj la flankenpelado aŭ fordrivado en analfabetismon devas esti nepre haltigataj", postulas la Munkena docento *Aleksander Pavkovic*: "*Braille* – tio estas kaj restas por ni blinduloj kvazaŭ 'ses ĝustaj divenoj sur lotokuponon' kaj la perdo al klerigado!"

Notoj

- 1) La "festo de la brajla skribo" en interreto: www.tour-de-braille.de
- 2) Varbado por la brajla punktoskribo: www.tour-de-braille.de
- 3) La "Subten-organizo por Blinduloj" en la urbo *Eupen*/Belgio tradukas leterojn en brajlopunktojn: www.braillepost.de
- 4) vd. ankaŭ en Internacia Universitata Prelego IKU-62 de d-ro *Otto Prytz*/Oslo: "La invento de la jubileulo *Louis Braille* daŭrigebla kaj daŭriginda" (2-a Sesio Bjalisto-ko/Polando, 2009, p. 113-120)..

Adreso de la aŭtoro

Martin EBNER

Marienweg 2

DE – 78465 Konstanz / GERMANIO

<martinebner@hotmail.com>

Priaŭtora informo

Martin Ebner laboras kiel ĵurnalisto por germanlingvaj gazetoj. La supran artikolon li esperantigis (helpe de s-ino *Irmtraud Bengsch*) surbaze de sia gazetartikolo "*Buchstaben streicheln*" (en "*Letzebuenger Land*" 2009-01-03) por festi la ducentjariĝon de la kreinto de la brajla skribo.